# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

PLENUMITA 01/08/2024 sescentnaŭdekoka eldono (unua eldono 26/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .



**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

# Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon Ĉiun tagon
Ne estas facile elekti el la ĉiuj tagaj programoj Do aŭskultu ĉiujn. 22a julio 2024
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2024/05/auskultu-kaj-ripetu-porcio-01.html
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2024/06/auskultu-kaj-ripetu-porcio-02.html
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2024/06/auskultu-kaj-ripetu-porcio-03.html
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2024/06/auskultu-kaj-ripetu-porcio-04.html
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2024/06/auskultu-kaj-ripetu-porcio-05.html
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2024/07/auskultu-kaj-ripetu-porcio-06.html
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2024/07/auskultu-kaj-ripetu-porcio-07.html
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2024/07/auskultu-kaj-ripetu-porcio-08.html
http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2024/07/auskultu-kaj-ripetu-porcio-09.html
Aŭskultu kaj ripetu - porcio 10 | Esperanta Retradio

## La paralela universo

***Paralela Universo*** estas unu-taga festo de Esperanto, okazonta en diversaj lokoj tra la mondo: https://paralelauniverso.com/. Ĉi-jare *Paralela Universo* (PU) okazos la 17-an de aŭgusto, kaj estos pli vaste festita ol iam antaŭe: por helpi, plusendu ĉi tiun invit-mesaĝon al Eo-organizantoj aŭ aktivuloj, kiujn vi konas. Eventoj estas interpersonaj (*ne* virtualaj) kaj kutime inkluzivos grupajn agadojn kaj manĝon, daŭrante kelkajn horojn. La celo estas doni al ĉiu esperantisto eblon partopreni sen vojaĝi tro for. Oni povos renkonti novajn kaj malnovajn amikojn, kaj fari ĝuindajn memorojn. Sendu vian eventon al la kunordiganto Jed Meltzer (*paralelauniverso@gmail.com*) aŭ afiŝu ĝin al la Gugla-grupo de *Paralela Universo 2024*: https://groups.google.com/g/paralela-universo-2024



Faru fotojn kaj afiŝu ilin rete, ekzemple sur la PU-paĝo en *Facebook:*
https://www.facebook.com/groups/paralelauniverso/ *Katja Steele*

## Homaj rajtoj kaj indiĝenaj popoloj

Jen informoj pri la Internacia Stipendio-Programo de la Konsilio de Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN). La celpubliko estas membroj de indiĝenaj popoloj.
Temas pri lertigado pri la situacio de indiĝenaj popoloj, konatiĝo kun la Deklaro pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, malkovro de la strukturo de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu lertigado okazas tra plena jaro en la franca, rusa, angla, hispana kaj portugala. La limdato por aliĝi por la venonta jaro estas la 31-a de aŭgusto 2024. https://www.ohchr.org/en/documents/brochures-and-leaflets/leaflet-indigenous-fellowship-programme *Katja Steele*

## 5-A VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO (VK): REZERVU LA DATON KAJ KONKURSU POR KREI LA OFICIALAN EMBLEMON DE LA VK!

Rezervu la daton! La **5-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK)** okazos de la 28-a de novembro ĝis la 1-a de decembro 2024 (de ĵaŭdo al dimanĉo). La VK estas organizata de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj teknike realigata de E@I. Kunrealigas la muzikan programon la eldonejo Vinilkosmo. Kaj gvidas la laborojn la 1-a Vicprezidanto de UEA, Fernando Maia Jr. Aliĝilo por la VK devos aperi maksimume ĝis septembro: ĝi alireblos per https://vk.esperanto.net. La 5-a VK estos senpaga por aktualaj individuaj membroj de UEA, kiuj aliĝos ĝis la 11-a de novembro 2024. Tial ĉiuj, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al UEA (aŭ TEJO) por 2024, bonvenas anticipi tion fari per https:/ /uea.org/alighoj/alighilo.



*Katja Steele*

## Esperanto Tago

*Peter Danzer*

**BES membroj festis Esperanto Tago ĉe la kultura centro en Brizbano je la 26a.Julio(20+)**



Brisbane Esperanto Society | Facebook







## AEA- estrarkunsido AEA- estrarkunsido Ĵaŭdon, la 25-an de julio 2024

Ĉeestis: Heather Heldzingen, Jonathan Cooper, Joanne Johns, Terry Manley, Bradley McDonald, Peter Danzer, Caroline TUrner, Jam Lee

**1) Somerkursaro 2025**

- La preparado daŭrigas.

Trevor Steele komencis prepari la 15 lecionojn.

- Reklamado

Aliaj statoj: QLD, TAS, WA, Internacie???

Ni bezonas cerbondojn kaj kreajn ideojn por allogi homojn

Ni devas konvinki homojn el diversaj partoj de la lando.

Kit Kelen.... varbas iomete inter la artistoj....

Bv rememorigi pri subvencio.

**2) Esperanto Domo en Melburno**

La serĉado daŭrigas..... la plej nova informo

Du eblaj domoj aspektis promesplena.... sed la "kurantaj kostoj" estis tro altaj

**(3) Prelegserio**

Daŭrigas. Konsideru partopreni.

La venontaj estos.... Dimanĉe,

- la 18-an de aŭgusto- la 15-an de septembro- la 20-an de oktobro-ktp....

**- (4) ESK**

Ni bezonas artikolojn...

**Venonta kunveno;**

Ĵaŭdo, la 8-an de aŭgusto 2024 je la 17:00-a

## ANF/Goma

Gekaraj saluton,

Nuntempe ni refoje turniĝas al vi petantaj viajn helpojn . Ĉar ni devas nun ekprepari la pagojn de la lernomaterialoj kaj uniformoj por la venonta studojaro 2024-2025. Tiam kun viaj helpemaj koroj ni ĝojus ricevi ĉian helpon vian por tio.

Ĉu vi povus financi kompleton por unu, eble eĉ por du, ... georfoj? Ĉu vi konas aliajn karajn homojn, kiuj povus aldone helpi per mondonacoj?

Notindas ke pro la ne-stabilaj prezoj ĉi-tie kaj en la mondo, ni petegas al ĉiu zorganto kaj helpanto, se eblas financi frue por ke ni disdonu ĉion al la georfoj antaŭ komenco de la studjaro, do fine de aŭgusto aŭ komence de septembro.

Por ke vi estu certaj pri la antaŭaj disdonadoj de la lernejaj materialoj, jen fotoj kiel ni disdonis pasintjare, post ricevo de viaj helpoj.




Por monsendi vi povas uzi:

**PayPal al cifrank@t-online.de (link sends e-mail) kun rimarko „georfoj"**

Ni kontakteblas ĉe: orfojkongo@gmail.com

Nome ANF *Augustin kaj Betti*